

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj februare 2010

03.02	Lidia Ligeza-	Akuzativo kun infinitivo kaj aliaj verbaj strukturoj
10.02	Anna Ramza-Kozioł	Tri oraj haroj el kapo de l' diablo. Interpreto de fabelo de fratoj Grimm
17.02	Grażyna Porada	Novaĵoj de firmao „Betterware” plibonigantaj la vivon
24.02	Andrzej Kołpanowicz	Superrealismo en pentroarto

Superstiĉoj rilatantaj al nia ĉiutaga vivo

Ĝis nun konserviĝis kutimoj, kiuj en multaj medioj estas aplikataj tute serioze, kun dozo da dubo aŭ eĉ serĉeme. Se ni renkontas surstrate kamenpurigiston en nigra, laŭregula vesto - estas tre bone, okazos io agrabla kaj favora. Tiun bonŝancon ni povas fortigi, kaptante butonon de la propra vesto. Komence de la Nova Jaro loĝejojn kaj domojn vizitadas kamenpurigistoj kun kalendaro kaj bondeziroj, sciante, ke ĉiu volonte ilin akceptos kaj malavare pagos por ĉi kalendaro.

Laŭ multaj fontoj viro simbolas i.a. saĝon, scion, inventemon, forton, ordon, majeston. Ĉe okultistoj viro reprezentas konscion, virino - subkonscion. Verŝajne tial multaj kutimoj lanĉis la vidpunkton, ke nekompareble pli bone estas renkonti viron, precipe en specialaj momentoj. Mi memoras de la familia hejmo, ke ĉiun unuan tagon de la jaro venadis al ni amiko de mia patro, tre frue, vekante ĉiujn, por certigi al la tuta familio feliĉon kaj prosperon dum la tuta Nova Jaro. La pripenso kaj intenco estis sendube tre noblaj. Venantaj pli poste onklinoj kaj amikoj de la domo ne scipovis jam nian feliĉon fuŝi.

Interese, ke en tiom katolika lando kiel nia, oni opinias, ke ne estas bone renkonti monaĥinon. Krom fakto, ke ŝi estas virino, povas aĝi duobla negativa magio, mistero de la klostra izoleco kaj mistero de la netipa vesto povis timige influi al tiel nomata simpla homo. Monaĥino ne estas tiom danĝera, kiom la nigra kato, sed la renkonton pli prefere ni evitu.

Sankta besto de Egiptio - kato jam antaŭ 1500 jaroj estis omaĝata en temploj de diino Bastet. Ĝi estis tre estimata ankaŭ en Romo, ĉar ĉasante musojn kaj ratojn ĝi gardis rikoltojn. La mezepoko donacis al ĝi malbonajn ecojn, ĉar akompanante al sorĉistinoj ĝi mem povis esti diablo, kiu en ĝin enkorpiĝis. Simboliko de tiu besto estas ligita kun la luno, ĉar ĝi ĉasas nokte, ĝiaj okuloj brilas kaj pupiloj ŝanĝas la formon kiel la luno. Nigra kato portas malhelon, danĝeron kaj morton, blanka - feliĉon. Kiam la nigra kato transkuras nian vojon, ni povas neniigi la malbonan sorĉon ekstarante, por ke la aliaj personoj prenu la magion de la nigra kato por sin. Se tio okazas al homo stiranta aŭtomobilon, li flankiĝas de la vojo, atendas tri aliajn aŭtojn, kaj kiam ili jam antaŭiĝos, li povas sekure kontinui la vojaĝon.

Se iu fremdulo neatendite surstrate demandas nin "kioma horo estas" - pli bone ne respondi, ĉar kun la respondo li aŭ ŝi povas forpreni nian bonŝancon kaj feliĉon almenaŭ por unu tago kaj povas esti, ke por pli longe.

Ĉi averto taŭgas nur por virinoj: malpermesate estas starigi aŭ meti la mansakon sur plankon. Tio kaŭzas rapidan defluon de la mono kaj malplenon en la monujo.

Tre atenteme ni devas aĉeti donacojn por la familio kaj geamikoj. Neniam ni donacu akrajn objektojn, kiel tranĉiloj, pingloj, kudriloj, hakiloj, adzoj. Ili povas igi miskomprenojn

kaj eĉ malamikajn sentojn inter ĝisnunaj proksimuloj. Precipe la tranĉilo havas en taroto kaj en aroj de simboloj tre malbonan opinionon kiel armilo de la perfido kaj kaŝaj fi-agoj kontraŭe al glavo, per kiu oni povis aparte kaj noble batali. Ankaŭ ni ne donacu perlojn, eĉ artefaritajn,

ĉar laŭ diversaj konvinkoj malnovaj kaj aktualaj, perloj estas ŝtoniĝintaj larmoj, do povas alporti al la doonacito ĉagrenojn kaj malfeliĉojn. Malpli romantikaj ol perloj - naztukoj ankaŭ ne estas konvena donaco. Kiel objektoj, per kiuj oni sekigas larmojn, ili povas igi ploron pro la laŭvicaj malfavoroj de la sorto ĉe personoj, kiuj ilin ricevis.

Tutcerte nin atendas malagrablajoj, kiam ni disŝutos salon; ni almenaŭ kverelos kun iu. Tiun aŭguron ni povas forturni ĵetante pinĉprenon de salo tra la maldekstra brako. Ĉi konvinko devenas de antikveco, kiam oni ŝutis salon sur la viktimaj bestojn kaj hazarda disŝuto de ĝi sur teron signifis plimalfortigon de la viktimo.

Se ni deziras certigi al si plenumon de nia grava aŭ malpli grava deziro, ni influas la sorton trifoje frapante per la maldekstra mano al nekolorigita ligno, plej ofte troviĝebla sur la inversa flanko de la tablo. Maldekstra mano (ankaŭ brako de la antaŭa kutimo) pli taŭgas al sorĉoj, ĉar tiu flanko apartenas al diablo kaj malhelaj fortoj. En multaj kulturoj arbo aŭ ligno simbolas favoron de la sorto, ĝojon, belon kaj eĉ sanktecon. Senpera kontakto kun ĝi garantias sukceson de niaj planoj.

Sojlo, simile kiel pordo kaj pordego, simbolas transiron de loko al loko, aŭ de stato al stato, fiksas limon inter lumo kaj tenebro, inter mondo konata kaj nekonata. La antikvaj romanoj precipe estimis la sojlon de hejmo, celebrante ĉe ĝi nuptajn ceremoniojn. Malnova kutimo aplikata ĝis nun - transporti la novedzinon trans sojlon - signifas, ke por ŝi komenciĝas la tute nova vivo kun nekonataj antaŭ la nupto devoj, plezuroj kaj ĉagrenoj.

Salutante iun trans sojlo ni agas malĝuste, ĉar ne eblas samtempe ekzisti en du realoj. Krom tio gaston decas akcepti favore, do plenplene en la hejmo, dum kiam la malamikon ni rajtas ne tralasi trans nian sojlon.

Domo simbolas i.a. sekurecon, rifuĝejon, fortikaĵon, stabilecon kaj ion propran. Ekstere jam regas la alia realo, povas esti, ke danĝera. Do bone estas ne forlasi la hejmon senprudente; sen la ĝusta pretiĝo. Tial antaŭ la malproksima vojaĝo, kiu povas multe influu nian vivon - ni dum pli longa aŭ pli kurta momento sidas, por montri, ke ĝuste ĉi tie estas nia loko, kaj ke ni volas tien reveni. Ankaŭ pli bone estas ne reveni hejmen tuj post tio, kiam ni fermis pordon. Pordo aŭ pordego simbolas limon inter du mondoj kaj du realoj, do pli bone kaj pli feliĉe estas ne miksi du kontrastajn intencojn - foriri kaj tuj reveni - por ne domaĝi al la loĝejo aŭ al si mem.

Spegulo estas fascina objekto. Literaturo ne rare montras vivon en alia, malantaŭa flanko de la spegulo. Oni ĝin utiligadis ĉe sorĉoj kaj alvokado de spiritoj. Kristanoj opiniis, ke spegulo estas kiel la homa animo - scipovas montri puran bildon de Dio. Ligon inter spegulo kaj la homa animo bildigas kutimo kovri spegulojn en hejmo de mortinto ĝis la entombiga solenaĵo. Fatale estas disrompi spegulon. Kiom da pecoj tiam formiĝas, tiom da jaroj de malfeliĉo atendas la rompanton. Precipe oni povas esperi la psikajn malsanojn kaj financajn klopodojn, pri kio ankaŭ informas kartoj de taroto.

Finante ĉi neplenan trarigardon de la kutimoj malnovaj kaj aktualaj - mi bondeziras al vi, por ke vi renkontu sur viaj vojoj nur kamenpurigistojn kaj neniam monaĥinojn kaj nigrajn katojn.

Lidia Ligeza

Sinagogo de Isaako

Sinagogo de Isaako troviĝanta en malnovjuda kvartalo de Krakovo, Kazimierz, estas la plej granda kaj impona konstruaĵo de tiu urboparto. Ĝi estis konstruita en periodo de la plej granda splendo de juda komunumo en Krakovo, ĉirkaŭ 1640 per nekonata itala arkitekto en la frubaroka stilo. Fondis ĝin la senioro de krakova juda komunumo Izaak Jakubowicz (Icchok reb Jেকেles), alidirite Isaako filo de Jakobo.

Pri historio de la sinagogo kaj ĝia fondinto ege interese rakontis Henryk Halkowski, (bedaŭrinde mortinta antaŭ unu jaro) historiisto, tradukisto, eksperto pri kasidismo kaj historio de krakova Kazimierz. Jen unu historio, kiu enfiksas en mia memoro:

... en la juda urbo Kazimierz apud Krakovo vivis iam pia kaj diotima sed malriĉa judo, kiu nomiĝis Icchok reb Jেকেles – Isaako filo de Jakobo. Li tre peze laboris por vivteni sian multnombran familion kaj samtempe ĉiam laŭdis Dion kaj dankis Lin pro ricevitaj favoroj. Iun nokton li sonĝis pri trezoro kaŝita sub la malnova ponto en urbo Prago en Ĉeĥio; ĉi tiu trezoro estis destinita nur por li. La venontan tagon matene Isaako filo de Jakobo ne prikonsiderante tro longe, adiaŭis la edzinon kaj infanojn kaj ekmarŝis longan, foran vojon. Li iris dum tagoj kaj noktoj, trapasante riverojn kaj montpasejojn, ĉirkaŭante sovaĝajn arbaregojn kaj profundajn lagojn, preterirante urbojn kaj vilaĝojn. Post la longa vagado li ekvidis finfine la potencan remparzonon, la altajn murojn kaj la sunbrilantajn turojn de urbo Prago. Li eniris la urbon kaj proksimiĝis al la ponto. Li tamen ne sciis, kion fari, ĉar la ponto estis gardita de armita taĉmento kaj Isaako filo de Jakobo ne kuraĝis fosi sub ĝi. Kiam li tiel staris embarasita sub la ponto kaj cerbumis, kion fari, alvenis al li oficiro kaj demandis lin, kion li serĉas. Isaako filo de Jakobo ekpensis, ke kiam li konfesu la tutan veron, ili ambaŭ povas elterigi la trezoron por interdividi ĝin po duono. Ja duono de trezoro estas pli bona ol nenio. Li rakontis do la sonĝon al la oficiro. La oficiro ekridis. „Nur stultaj polaj judoj kredas je sonĝoj”- li diris. „Mi jam multaj noktoj sonĝas, ke en la juda urbo Kazimierz apud Krakovo en forno de domo de iu malriĉa judo, kiu nomiĝas Isaako filo de Jakobo kaŝita estas trezoro. Ĉu vi pensas, ke mi estas tiel stulta, por ke veni Krakovon kaj serĉi domon de tiu Isaako filo de Jakobo? Ja preskaŭ ĉiu la dua judo estas Isaako, kaj ĉiu la tria Jakobo”. Isaako dankis al la oficiro kaj ekis revojiĝi. Li marŝis multajn tagojn kaj noktojn, trapasante riverojn kaj montpasejojn, ĉirkaŭante danĝerajn arbaregojn kaj profundajn lagojn, preterirante urbojn kaj vilaĝojn. Kiam finfine li revenis hejmen, senprokraste li malkonstruis la fornon kaj trovis la trezoron. De tiu tempo Isaako filo de Jakobo iĝis la plej riĉa judo en la urbo Kazimierz apud Krakovo. Li vivis ankoraŭ multajn jarojn, donacante monon por malriĉuloj aŭ por aliaj noblaj intencoj. La parton de la trovita trezoro Isaako oferis por konstruado de sanktejo, kiu ĝis hodiaŭ portas lian nomon. Kiam najbaroj demandis lin pri fonto de lia riĉeco, li tiel respondadis: “Ekzistas aĵoj, kiujn oni serĉas sur la tuta mondo kaj oni trovas ilin en la propra hejmo. Tamen, por ke konvinki pri tio, oni devas ekiri longan vojon kaj malproksime serĉi ilin.”

prilaboris Andrzej Kotpanowicz

